

# La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2026. №1



## Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2026. №1 (327)

**La Ondo de Esperanto** aperas kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

**Aperas** ĉiusezone. Senpaga literatura suplemento jarfine.

**Fondita** en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

**Eldonas kaj administras:** Halina Gorecka

**Redakcio:**

Aleksander Korĵenkov (redaktoro)

Paweł Fischer-Kotowski (vicedaktoro)

Peter Baláž

Stanislav Belov

István Ertl

Irina Gonĉarova

Povilas Jegorovas

Wolfgang Kirschstein

Paŭlo Moĵajevo

**Poŝta adreso:** RU-236039 Kaliningrad, Staropregolskaja nab., 10-13, Ruslando

**Retpoŝta adreso:** laondodeesperanto@gmail.com

**Retejoj:** <https://esperanto-ondo.ru>, <https://sezonoj.ru>

**Abontarifo por 2026**

Abonanto: 15 eŭroj, 17 usonaj dolaroj, 850 rubloj

Amiko: 30 eŭroj, 34 usonaj dolaroj, 1700 rubloj

Patrono: 100 eŭroj, 110 usonaj dolaroj, 5500 rubloj

**Anonctarifo**

Plena paĝo: 50 eŭroj (5000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (3000 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (1500 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (1000 rubloj)

Triona rabato pro ripeto.

**Donacoj:** La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

**Recenzoj:** Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

**Represoj:** Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2026, №1 (327).

Ежеквартальный журнал на языке эсперанто.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 3 апреля 2026 г.

Bazaj informoj pri “La Ondo de Esperanto” .....	2
En ĉi tiu numero .....	3
<b>Redakcie</b> .....	<b>5</b>
Aleksander Korĵenkov. Esperanto-novaĵoj: Pli ol 800 abonantoj .....	5
<b>Eventoj</b> .....	<b>6</b>
Ulrich Brandenburg. Jarfino inter vitejoj: Luminesk’ en Bingen .....	7
Lu Wunsch-Rolshoven. Viva novjarfesto .....	8
Klara Wieland, Annika Weeser-Krell. Impresoj de JES 2025/26 en Burg (Spreewald) .....	10
Bharat Kumar Ghimire. Esperanto sonas en Himalajo .....	12
Rudolf Fischer. Bibliaj Tagoj ĉe Rejno .....	14
Povilas Jegorovas. Esplorvojaĝo de UEA en Kaŭno .....	15
730 esperantaĵoj en Kroata ŝtata arkivo .....	16
EAE mortis, sed BET plu vivos en Estonio .....	16
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Ranja Zafinifotsy: la Esperantisto de la Jaro 2025 .....	17
Konkurso: Plej bona reganto de Esperanto 2026. ....	18
Iĝu komitatano B de TEJO .....	19
Precizigo de KCE pri “Svislando” en la retejo de UEA .....	19
Aleksander Korĵenkov. 891 aliĝintoj al la kongreso en Graco .....	20
Aleksander Korĵenkov. La Dua Bulteno de la 111a UK .....	20
Klaus Schubert, Bengt-Arne Wickström. La 48a Esperantologia Konferenco de CED .....	21
Kroatio: Kongreso, ekskurso kaj feriado .....	21
La Hispana Kongreso okazos en Eŭskio .....	22
Irina Gonĉarova. APERo-19 invitas! .....	23
La 9a Afrika Kongreso de Esperanto .....	24
Mireille Grosjean. La unua virina kongreso de UEA .....	25
ILEI kunvenos en Zaozhuang .....	25
Intensaj kursoj kaj ekzamenoj en la Esperanto-kastelo .....	26
Koncize (7 novaĵoj) .....	27
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Ni funebras kaj kondolencas .....	28
<b>Tribuno</b> .....	<b>29</b>
Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, la 21a de februaro 2026. ....	30
Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Virina Tago .....	31
Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago de Matematiko, la 14a de marto. ....	31

UEA subtenas la iniciaton “Monto Zamenhof” .....	34
SAT kondamnas la Usonan invadon al Venezuelo. ....	35
Kirilo Brosch. Lingva Konsultejo: Metafora uzo de “ŝlosila”. ....	36
<b>Arkivo</b> .....	<b>37</b>
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en aprilo 2026 .....	38
Hans Jakob. Esperantistaj problemoj. III. La literaturo .....	41
<b>Kulturo</b> .....	<b>44</b>
Wolfgang Kirschstein. Nigra romantiko kaj sublimesa arto .....	45
E. T. A. Hoffmann. La sabloviro (Tradukis el la germana Wolfgang Kirschstein) .	50
E. T. A. Hoffmann. La estetika te-societo (Tradukis el la germana István Ertl) ..	72
Laure Patas d’Illiers. La knabino kiu miaŭis .....	74
Paulo Sérgio Viana. Instruisto Luka. ....	76
Aleksander Korĵenkov. 67 libroj: La plej magra jarrikolto .....	80
Tim Owen. Postprokraste: Libro komencita por Aruŝo inter la eldonaĵoj de EAB en 2025 .....	84
Wolfgang Kirschstein. Ĉu tio estis ĉio? .....	86
Wolfgang Kirschstein. Cent noveloj po cent vortoj (Recenzo: Jorge Rafael Nogueras. Centvorte) .....	91
Paŭlo Moĵajev. Albumo poetika kaj fortika (Recenzo: ĴeLe. Stacioj de l’ amo) .	92
Nova muzikvideo de Kris Fredi. ....	93
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Ankoraŭ du senpagaj libroj en nia retejo. ....	94
Literaturaj suplementoj al “La Ondo de Esperanto” .....	95
Aleksander Korĵenkov. Unesko-Kuriero pri arkeologio .....	96
Halina Gorecka. Beletro Almanako, 2025, N <sup>o</sup> 54. ....	97
Alessio Giordano. Literatura Foiro, 2026, N <sup>o</sup> 339, 340 .....	98
La 16a literatura konkurso “Esperanto ligas homojn”. ....	100
Internacia Traduk-Konkurso “Vejdo” 2026 .....	101
La fortreso: Nova bitlibro de HEA .....	102
<b>Mozaiko</b> .....	<b>103</b>
Stanislav Belov. Miaŭ! .....	104
István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj. ....	105
Perantoj de “La Ondo de Esperanto” .....	106

Kovropaĝe: Jam la 15an fojon Nepala Esperanto-Asocio (NEspA) organizis la 15an Internacian Himalajan Renkontiĝon, kiu okazis de la 26a de februaro ĝis la 8a de marto 2026 kun pli ol kvardek partoprenantoj, el kiuj 21 partoprenis la piedvojaĝon en la montara regiono Langtang.

## Esperanto-novaĵoj: Pli ol 800 abonantoj



La 13an de julio 2023 estis fondita la Telegrama kanalo “Esperanto-novaĵoj” ([https://t.me/esperanto\\_news](https://t.me/esperanto_news)). Post du monatoj ĉi tiu kanalo havis cent abonantojn, kaj la nombro daŭre kreskis.

Komence de marto 2026 la abonantaro superis 800, kaj je la 28a de marto “Esperanto-novaĵojn” abonas jam 819 personoj, kiuj ĉiutage ricevas koncizajn mesaĝetojn, plejparte pri novaj publikaĵoj en la novaĵretejo “La Ondo de Esperanto” (<https://sezonoj.ru>).

Telegramo estas senpaga nuba tujmesaĝilo por komputiloj kaj poŝtelefonoj. Esperantistoj uzas ĝin por sendi tekstajn kaj voĉajn mesaĝojn, kaj por telefonvoki kaj videovoki aliajn parolantojn. Eblas sendi per ĝi ĉian enhavon: bildoj, filmetoj, movbildoj, glumarkoj kaj dosieroj.

En Telegramo funkcias **grupoj**, en kiuj la membroj interparolas pri temoj, al kiuj estas dediĉitaj la grupoj, kaj **kanaloj**. Kanalo en Telegramo estas unudirekta loko kun mesaĝoj pri difinita temo. Malkiel grupo, kanalo estas loko ne por diskuti, sed por informiĝi pri difinita temo, sed ĉe la kanalo “Esperanto-novaĵoj” funkcias samnoma grupo/babilejo.

Kun pli ol 800 abonantoj “Esperanto-novaĵoj” estas la dua plej populara Esperanto-kanalo en Telegramo post “Librejo”, en kiu oni anoncas elŝuteblecon de libroj (ankaŭ de “pirataj” eldonoj).

La plej abonataj Telegram-kanaloj en Esperanto estas:

- 1646 Librejo: libroj en Esperanto
- 819 Esperanto-novaĵoj
- 539 Esperantaj memeoj
- 520 Эсперанто-Лето
- 495 Radio en Esperanto
- 493 Esperanto en Rusio kaj en la mondo

(Bedaŭrinde, la statistiko ĉe <https://telegramo.org/kanaloj/> estas longe neĝisdatigata, kaj eble estas pliaj popularaj kanaloj en Esperanto.)

Se vi uzas Telegramon kaj vin interesas novaĵoj pri Esperanto kaj esperantista agado, aliĝu al la kanalo “Esperanto-novaĵoj” ĉe [https://t.me/esperanto\\_news](https://t.me/esperanto_news).

**AIKO**

**Iĝu abonanto de “La Ondo de Esperanto”!**

# *Eventoj*



**Je la novjarfesta noktomezo en la Germaniaj urboj Burg (Spreewald), Wiesbaden kaj Bingen esperantistoj ĝoje interŝanĝis gratulojn okaze de la komenciĝinta jaro 2026a. (Foto de Ivo Miesen el JES-16 en Burg).**

## Jarfino inter vitejoj: Luminesk' en Bingen

Jarfinaj Esperanto-renkontiĝoj en Germanio havas longan tradicion: jam en la 1950aj jaroj ĝin komencis Germana Esperanto-Junularo kun la Internaciaj Seminarioj (IS). Por la meza aĝgrupo poste sekvis la Internaciaj Festivaloj (IF) organizitaj de Hans-Dieter Platz kaj la Novjaraj Renkontiĝoj (NR), kiujn daŭre organizas la asocio EsperantoLand gvidata de Lu Wunsch-Rolshoven. La tradicion de IF jam pli ol dek jarojn daŭrigas la silvestra renkontiĝo Luminesk' de Germana Esperanto-Asocio. Kaj el la iama IS fariĝis la Junulara Esperanto-Semajno (JES), ĉiam ankoraŭ renkontiĝo ĉefe por gejunuloj. Kial tiom da jarfinaj esperantaĵoj en Germanio? Ĉar dum tiuj tagoj preskaŭ ĉiu havas libertempon, ĉar en Germanio ekzistas densa reto de junulgastejoj (kiuj fariĝis relative komfortaj kaj volonte ankaŭ akceptas maljunulojn), klerigaj domoj kaj feriejoj ne tro kostaj kaj taŭgaj por kunvenoj kiel la niaj, kaj ĉar kunigi ĉiujn tri kaŭzus spacproblemojn. Ankaŭ la etoso verŝajne suferus kaj la celgrupoj estas malsamaj.

Ĉi-jare JES okazis en Burg (Spreewald) apud Berlino, NR kiel kutime en Wiesbaden, kaj Luminesk' en la vinfara kaj turisma urbeto Bingen, en domo kun belega panorama rigardo tra la Rejna valo. Entute do kunvenis inter 300 kaj 400 Esperanto-parolantoj samtempe en la sama lando: pruvo ke la movado restas vigla kaj renkontiĝema.



Pupteatraĵo de Christoph Frank (Foto: U. Brandenburg)

Tipa por Luminesk' – la plej malgranda el la tri – fariĝis la loka fokuso, ĉi-foje do la specialaĵoj de Bingen. Ties plej konata historia figuro certe estas la monaĥino (intertempe sanktulino) Hildegard von Bingen, kiu vivis de 1098 ĝis 1179. Ŝi estis unu el la grandaj intelektulinoj de sia epoko kaj postlasis ampleksan verkaron pri teologio, priskribojn de sanigaj plantoj kaj kuracmetodoj, pli ol 70 muzikaĵojn kaj eĉ artefaritan lingvon “Lingua ignota”. Pri ŝi memorigas ekspozicio en la loka muzeo, kiun vizitis la Luminesk-anoj. Barbara Brandenburg aldone prelegis pri la sanigaj plantoj de sankta Hildegard kaj kunportis specimenojn.

Bonan enkondukon en la vinkulturan tradicion de tiu regiono (kun vingustumado por ĉiuj partoprenantoj) prezentis Martina Sachs-Bockelmann, kiu loĝas en apuda vilaĝo. Aliaj prelegoj pritraktis abelbredadon (Waldemar Ebel), spacveturadon (Amri Wandel), “reterigon” (Wera Blanke), afrikan literaturon (Anna Lowenstein), fabelojn (Christiane Oetter) kaj multajn aliajn temojn. Christoph Frank prezentis pup-teatraĵon por plenkreskuloj, Ankie kaj Nanne (“Kajto”) dum la tuta semajno zorgis pri muziko kaj bona etoso. Barbara kaj Ulrich Brandenburg kun Maria Merla prezentis la urbon de la venonta UK. Ekskursoj – favorprezaj, ĉar per fervojo aŭ pramŝipo – kondukis al la apudaj vinurbetoj Bacharach kaj Rudesheim kaj al la landa ĉefurbo Mainz: ĝin ankoraŭ gvidis Wolfgang Schwanzer. Pluraj partoprenantoj ankaŭ uzis la eblecon viziti la Novjaran Renkontiĝon en Wiesbaden, nur 35 kilometrojn for.

Venontan fojon la distanco denove estos pli granda. Tiam Luminesk' okazos en la grandurbo Bremen en norda Germanio, denove de la 28a de decembro ĝis la 3a de januaro. Detalojn vi trovos en la retejo de Germana Esperanto-Asocio <https://www.esperanto.de/>. Bonvenon do decembre en Bremen!

**Ulrich Brandenburg**

## **Viva novjarfesto**

En Wiesbaden dum la pasinta novjaro okazis la 22a Novjara Renkontiĝo (NR) de EsperantoLand – internacia kunveno, kiu denove montriĝis vivplena kaj multflanka evento. Kunvenis entute 161 partoprenantoj el 14 landoj, inter kiuj 31 infanoj kaj junuloj, kiuj kune ĝuis la programon.

Kiel dum la antaŭaj jaroj, ĉiuj ĉambroj en la junulargastejo de Wiesbaden estis okupitaj; aldone pro la granda intereso dekduo da gastoj loĝis en proksima hotelo. La programo estis riĉa kaj diversspeca, al kio kontribuis la pli ol sesdek programkontribuantoj.

La vesperoj estis vivoplenaj pro pluraj koncertoj, de la duopo ĴeLe kaj de Kim. En la tradicia novjara koncerto prezentiĝis interalie Birke kaj duope Luigi kaj Debora. Aldone okazis piankoncerto de Ludger Schmeink, koruso prezentis pacan kanton dum la Internacia Vespero, kaj du pupteatraĵoj entuziasmigis la junajn kaj la maljunajn gastojn.

La renkontiĝo komenciĝis per konatiĝa vespero, dum kiu oni interŝanĝis ankaŭ kulinariajn specialaĵojn. La tradicia “Kio okazos?” – konkurso por diveni la rezulton de fizikaj eksperimentoj – denove altiris tri teamojn kaj la entuziasman atenton de la publiko. Alia populara aktivaĵo estis la “Lud-dekatlono”, ludeca konkurso kun dek variaj defioj.

Por sportemuloj kaj kreemuloj estis ofertataj Zumba, ĵonglado, presado de tasoj kaj komuna kuirado. Turniro pri tabloteniso donis okazon por konkursi, dum la metia programo por infanoj stimulis ilian kreivecon.

Ne mankis ankaŭ intelektaj interŝanĝoj: Dum diskutrondoj oni traktis aktualajn mondpolitikajn temojn kiel Eŭropon, la militon en Ukrainio, la rolon de Usono, la konflikton inter Israelo kaj Palestino same kiel la situacion en Ĉinio. Aldone la programo inkluzivis viziton al diservo, komunan promenadon dum la Novjara Tago, kaj ekskursojn al Majenco, naĝejoj, la Bahaa Templo en Hofheim-Langenhain, kaj al la kastelo Biebrich.

Kiam en konstruaĵo mankas saŭno, indas simple kunporti ĝin! Tiel okazis dum ĉi tiu renkontiĝo, kie tendosaŭno estis intense uzata dum la tuta semajno. La kulmino de la evento estis kiel kutime la Silvestra Vespero, kie ni festeme kaj danceme adiaŭis la malnovan jaron.

La 22a Novjara Renkontiĝo denove montris, kiel vivoplena kaj diversflanka estas la Esperanto-komunumo – kaj kiom ŝatata tradicio estas la novjarfesto por multaj.

**Lu Wunsch-Rolshoven**



Lecliono de ĉigongo en Wiesbaden (Foto: Ulrich Matthias)

## Impresoj de JES 2025/26 en Burg (Spreewald)

La JES (Junulara E-Semajno) estas novjara evento, kiu okazas en Eŭropo, kutime en Germanio aŭ Pollando. Ĉi-foje 127 partoprenintoj kunvenis en la urbeto Burg (Spreewald), Germanio, por la multfaceta programo de la 28a de decembro 2025 ĝis la 4a de januaro 2026 kaj komencis la novan jaron kune. Por ni estis la unua JES kaj nun ni volas rakonti al vi pri niaj spertoj.

Nia ejo en Burg havis du partojn. La gastejo, kie ni manĝis, kie la plejmulto de ni dormis kaj kie la matena programo okazis, kaj, unu kilometron for de tie, la lernejo, kie okazis la posttagmeza kaj vespera programo. Kelkaj dormis tie en la amasloĝejo, sed ni aŭdis ke estis laŭtege nokte kiam la lastaj partoprenintoj festis ĝis la sekva mateno. Ĉe la gastejo ankaŭ troviĝis “Finnhäuser”, lignaj dometoj, la plej malvarma dormebleco.

Kvankam ĝi estis *Junulara E-Semajno*, ni renkontis homojn de ĉiuj aĝoj, kio estis kompreneble interesege. Venis partoprenintoj el multaj diversaj landoj: el Germanujo memkompreneble, sed ankaŭ el Francio, Nederlando, Belgio, Italio, Svislando, Skotlando kaj tiel plu. Eĉ uloj el Usono kaj Ĉinio alvojaĝis. Dum la unuaj tri tagoj okazis la oficiala parto de JES, kiel la malfermo kun la interkona vespero kaj la membrosambleo de GEJ.

Kiel kutimas en Esperantujo, estis organizita vasta oferto de agrabla miksaĵo el diversaj temoj dum la tuta semajno. Oni povis lerni Esperanton ne nur en komencantaj kaj progresintaj kursoj sed ankaŭ en prelegoj pri diversaj temoj. Ekzemplaj temoj de JES en Burg estas HIV kaj aidoso, unua helpo, histinĝenierado kaj la divido en Kipro. Krom la fakto, ke la prelegoj kaj atelieroj okazas en Esperanto, kio ebligas lerni ĉiuspecajn novajn vortojn, estas avantaĝo, ke vi ne bezonas iujn ajn antaŭajn sciojn pri la fakoj kaj povas demandi la preleganton. Tiuj, kiuj preferis fari ion eĉ pli aktivan, povis provi kanti plurlingvajn kantojn, kroĉeti aŭ danci skotajn popoldancojn.

Dum kaj post la lernado, la amuzo ne estis neglektita kaj la programo kompreneble ne povis finiĝi post la vespermanĝo! Ni ĉiuvespere aŭskultis koncertojn en la granda salono de la lernejo. Estis multaj malsamaj muzikĝenroj: kantoj akompanitaj de piano, gitaro aŭ akordiono, muziko de loka alternativa rokbanda aŭ elektro-punka tekno, estis io por ĉiuj. Sed ankaŭ se vi preferis trankvilecon en la vespero, JES havis opciojn por vi. En la gufujo ni trinkis teon, manĝis biskvitojn en nestreĉa etoso, kreita de la falsa bivakfajro en la ekrano.

**Ĝi estas demonstra versio de la 108-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

## Ranja Zafinifotsy: la Esperantisto de la Jaro 2025

27 fojojn ekde 1998 ĝis 2024 internacia komisiono ĉiujare atribuis la honoran titolon “La Esperantisto de la Jaro”. La 27a atribuo estis la lasta. Tamen la novaĵretejo “La Ondo de Esperanto” ĉi-jare anoncis “popolan voĉdonadon” por “La Esperantisto de la Jaro 2025” kaj funkciigis retan voĉdonilon kun 12 kandidatoj (fakte 13, ĉar en la listo estas du fratoj-kunaŭtoroj).

La voĉdonado finiĝis la lastan minuton de la 31a de januaro.

Dum ĉi tiu semajno voĉdonis entute 400 personoj, kiuj donis 611 voĉojn al unu, du aŭ tri kandidatoj.

### La rezulto de la voĉdonado:

- 114 Ranja Zafinifotsy
- 111 Rafael Henrique Zerbetto
- 94 Fernando Maia Jr.
- 59 Aleksander Korĵenkov
- 46 Floréal Martorell
- 36 Anatolij Ionesov kaj Vladimir Ionesov
- 36 Povilas Jegorovas
- 32 Irina Gonĉarova
- 24 Pawel Fisher-Kotowski
- 22 Dennis Keefe
- 19 Wolfgang Kirschstein
- 18 Sten Johansson

**Ranja Robertine Jeanne d’Arc Lydie Zafinifotsy Ep Randrianandrasana** estas 29-jara malagasa esperantistino kaj direktorino de lernejo en malriĉa kvartalo de Antananarivo. Ŝi preferas la Esperantan prononcon Ranja de sia persona nomo al la malagasa Ranĵ, dum ŝia familia nomo Zafinifotsy estas prononcata Zafinifúc.

Esperanton ŝi eklernis en 2018, kaj en 2021 ŝi iniciatis la refondon de Malagasa Esperanto Junulara Asocio kaj elektiĝis ties kasistino. Komence de 2022 ŝi debutis kiel Esperanta verkistino per la rakonto “La sorto de Aina”.



**Ĝi estas demonstra versio de la 108-paĝa marta Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

# Tribuno



En februaro UEA subtenis iniciaton, kiu celas per reta petskribo renomi la monton Vaalserberg al Monto Zamenhof, honore al la iniciatinto de Esperanto. Sed du monatojn poste ĉi tiun ideon per siaj voĉoj apogis nur 849 esperantistoj...

# Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, la 21a de februaro 2026



La Internacia Tago de la Gepatra Lingvo originas el la lukto por la rajto uzi la gepatran bengalan en 1952 en la tiama Orienta Pakistano, nun Bangladeŝo. La tago memorigas nin, ke lingvo estas grava parto de identeco de popoloj kaj komunumoj. Lingvoj transdonas tradiciojn, sciojn kaj historion. Kaj infano, kiu eklernas per la propra denaska lingvo, lernas plej facile kaj digne.

Por antaŭenigi fortajn komunumojn, oni bezonas antaŭenigi multlingvismon. Ĉiu homo rajtu lerni kaj kreski per sia gepatra lingvo, kaj ankaŭ akiri regionajn kaj naciajn lingvojn, kaj internaciajn lingvojn. Per multlingvismo, saĝe utiligata, ĉiu persono povas partopreni, paroli kaj esti aŭdata. Sekve, ĉiuj povas

kune decidi pri komuna estonteco.

Multlingva mondo bezonas multlingvan edukadon kaj multflankismon. Tio estas vojo al paco kaj justeco, al daŭripova evoluigo, kaj al realigo de la celoj de Unuiĝintaj Nacioj: paco, homaj rajtoj, internacia kunlaboro kaj amikaj rilatoj inter nacioj kaj popoloj. Lingva justeco postulas kreadon de medioj, kie ĉiuj lingvoj kaj voĉoj estas valoraj kaj havas spacon por ekzisti kaj prosperi, en digno kaj egaleco.

Por savi la kulturan diversecon de la mondo, ni savu ankaŭ la lingvan diversecon.

Universala Esperanto-Asocio ekde sia fondiĝo en 1908 laboras por antaŭenigi internacian komunikadon, komprenon kaj estimon inter popoloj. Pere de la internacia samrajtiga lingvo Esperanto, ni proponas interkomprenon inter homoj, tiel ke ĉiu homo rekonu unu la alian en sia hejmo, kaj kunvivu harmonie kaj pace.

Ni notas, ke ni baldaŭ atingos la mezan punkton de la Internacia Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj (2022-2032), kiu interalie celas konservi kaj fortigi la lingvajn homajn rajtojn de indiĝenaj popoloj, kaj garantii ke ili povas konservi, fortigi kaj disvastigi siajn lingvojn.

Ni invitas ĉiujn partopreni la Universalan Kongreson de Esperanto, kiu okazos de la 1a ĝis la 8a de aŭgusto 2026, en Graz, Aŭstrio. Ni renkontiĝos por kunfesti la homan diversecon en etoso de lingva egaleco kaj respekto, kaj debatos pri la volontulado en la servo al daŭripova evoluigo.

GK UEA

**Iĝu abonanto de “La Ondo de Esperanto”!**

# Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Virina Tago



Okaze de la Internacia Virina Tago 2026, Universala Esperanto-Asocio (UEA), organizo en Konsulta Statuso kun la Ekonomia kaj Socia Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj, salutas virinojn kaj knabinojn tra la mondo kaj reasertas sian engaĝiĝon antaŭenigi genran egalecon kaj virinajn rajtojn, kunlabore kun aliaj civilsociaj organizoj kaj internaciaj partneroj.

Ĉi-jare la temo de Unuiĝintaj Nacioj por la Internacia Virina Tago – “Rajtoj. Justeco. Agado. Por **ĉiuj** Virinoj kaj Knabinoj” – substrekas, ke egaleco postulas konkretan agadon. Por atingi veran justicon por ĉiuj, necesas forigi ĉiujn barojn al egala justeco: diskriminaciajn leĝojn, malfortajn aŭ neefikajn jurajn protektojn, kaj damaĝajn praktikojn kaj sociajn normojn, kiuj subfosas la rajtojn, sekurecon kaj dignon de virinoj kaj knabinoj.

Genra egaleco kaj plena partopreno de virinoj en ĉiuj sferoj de la vivo estas esencaj por justa kaj daŭripova evoluo. Sen efektiva aliro al justico, edukado, informo kaj decidprocezoj, rajtoj restas nur deklaroj surpapere.

UEA atentigas ankaŭ pri la graveco de lingva justeco. Por ke virinoj kaj knabinoj povu plene partopreni en la politika, ekonomia kaj kultura vivo, ili bezonas egalan aliron al lingvaj rimedoj – inkluzive de edukado en la gepatra lingvo kaj aliro al pliaj lingvoj por internacia komunikado. Lingva malegaleco plifortigas aliajn formojn de malegaleco. Per la Internacia Lingvo Esperanto kaj ĝia tutmonda reto de parolantoj, la Esperanto-movado kontribuas al pli inkluziva internacia dialogo kaj al pli forta voĉo de tutmonda civila socio, inkluzive virinojn kaj knabinojn.

UEA alvokas ĉiujn koncernajn instancojn agi decide kaj kun respondeco, por ke ĉiuj virinoj kaj knabinoj – sen escepto – ĝuu plenajn rajtojn, egalan protekton kaj realajn ŝancojn disvolvi sian potencialon.

**GK UEA**

**Ĝi estas demonstra versio de la 108-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# Lingva Konsultejo: Metafora uzo de “ŝlosila”

La Akademio de Esperanto en 1999 starigis sekcion Lingva Konsultejo (kiu ĝis 2007 nomiĝis komisiono). Ĉiu Esperanto-uzanto povas turni sin al la Lingva Konsultejo kun difinitaj lingvaj demandoj por ricevi konsilon aŭ rekomendon. Demandojn pri vortfarado (novaj nocioj, terminoj) la Lingva Konsultejo povas respondi relative rapide; malfacilaj gramatikaj problemoj kutime postulas pli longan tempon. “La respondoj ne estas decidoj de la Akademio de Esperanto, sed rekomendoj de la Lingva Konsultejo”.

## DEMANDO

La vorto “ŝlosila” laŭ PIV signifas

“Rilata al ~ilo, precipe 3 k 5.”

Tiu senco 5 estas “Tio, kio ebligas kompreni ion kaŝitan aŭ malklaran”.

Tamen, mi konstatas ke, supozeble pro la efiko de la angla “key”, “ŝlosila” nuntempe ofte estas uzata kiel simpla sinonimo de “grava”. Vidu ekz. en la Tekstaro trafojn el “La Ondo de Esperanto” kaj el “Le Monde Diplomatique”.

Ĉu ni bonvenigu tiun evoluon?

## RESPONDO

La uzo de “ŝlosila” kreskis konsiderinde antaŭ nelonge. La Tekstaro de Esperanto ja atestas pli ol 220 trafojn en la tekstoj aperintaj de post 1995, dum en la tuta antaŭa periodo la vorto aperis malpli ol 5 fojojn. Efektive en ĉiuj lokoj temas pri la metafora uzo de la vorto, do sen rekta rilato al la instrumento ŝlosilo.

Krom la baza metafora uzo laŭ PIV, nome “ebliganta kompreni ion kaŝitan aŭ malklaran”, oni ofte trovas ankaŭ derivitajn sencojn kiel “ebliganta kompreni aŭ klarigi ion malfacilan”, “ebliganta plenumi taskon alie apenaŭ eblan” aŭ “esenca por funkciigi aŭ ebligi ion”. En pliaj okazoj la vorto apenaŭ estas distingebla de la establita esprimoj “grava”, “kerna” kaj “ĉefa”.

Kiel ĉe ĉiu metaforo – aŭ fakte ĉia vorto –, trouzado iĝas ĝena kaj malfortigas la esprimon. Tial ni rekomendas uzi la vorton “ŝlosila” ne tro ofte, kaj precipe tie, kie ĝi sence aldonas ion al la abstrakta ideo de graveco, rilatante al la metafora uzo de ŝlosilo (do difinante ion, kio malfermas aliron, eblon). Kiel nura sinonimo de “grava” k. s. ĝi ne ŝajnas riĉigo de la lingvo, sed eĉ male.

La 20an de januaro 2026

Kun afablaj salutoj

**Kirilo Brosch – Cyril Robert Brosch**

Direktoro de la Lingva Konsultejo de la Akademio de Esperanto

## TRA LA MONDO ESPERANTISTA

### Esperantistaj problemoj.

#### III.

#### La literaturo.

La granda malsameco de nia movado kun tiu de aliaj sistemoj de tutmonda lingvo konsistas en la ekzisto de impona libraro esperantista. Super ĉiuj lingvaj disputoj restas tamen la fakto, ke ĉiuj konkurantoj ne sukcesis eldoni kaj *vendi* tiom da libroj kiel la esperantista movado. Kolektanto au libro-amanto nuntempa, deziranta aĉeti ĉion, kio aperas, baldaŭ trovas, ke tio fariĝos multekosta plezuro pro la regula seninterrompa apero de novaj verkoj. La tuta libraro esperantista kiun oni kalkulas je 4000 ĝis 5000 eldonaĵoj, el kiuj bona duono estas beletristika, prezentas do aktivajon, kiun ĉiu aŭtoritato devos konsideri ĉe serioza ekzameno de la mondlingva problemo. Jam impresa estas la nombro de originalaj verkaĵoj, noveloj kaj romanoj; ĝi estas la ĝermo de estonta esperantista kulturo.

donaĵoj supozante mezan eldonon de dumil ekzempleroj por ĉiu. Ni atingus tiam 60 000 ekzemplerojn kiuj devus vendiĝi. Nenia sekreto, ke ne vendiĝas ĉio; suferas pro tiu ĉi fakto la bonaj eldonaĵoj kies iom pli alta prezo malprave timigas la aĉetanton. Ĉu ne estus pli bone aĉeti *unu* bonan libron anstataŭ du au tri broŝuretojn por sama mono?

Tro da literaturo por sin distri, malmulte da sciencaj verkaĵoj en populariga formo. Tiun mankon eksentis jam antaŭ jaroj kelkaj pioniroj de la „malnova gvardio“ kaj serĉis plibonigon. Utilus eldoni bibliotekojn de sciencaj verkoj ĉu originalaj ĉu tradukoj rajtigataj de la respektivaj aŭtoroj. La efektiviĝo de tia plano dependas de du faktoroj: Kapitalo kaj eduko. La unua faktoro estas komprenebla al ĉiuj. La dua ŝajnas stranga. Efektive — eduko? Eduki la esperantistojn koncentrigi la rimedojn al impona entrepreno, kiu, se ĉio enordiĝas laŭplane, povus konigi nian movadon al rondoj ĝis nun skeptike nin rigardantaj. Grava eldona firmo intencas efektiviĝi tiun eldonon sisteman kaj serian de internacie

**Antaŭ cent jaroj en februaro 1926 Hans Jakob kadre de sia ciklo “Esperantistaj problemoj” aperigis en la revuo “Esperanto” artikolon pri la Esperanta literaturo. Ĉu kaj kiel la problemo statas post cent jaroj?**

# Jubileoj kaj memordatoj en aprilo 2026

2. Antaŭ 85 jaroj naskiĝis **Boris Aleksejeviĉ Zozulja** (Зозуля, 1941-1975-2020), sovetunia kaj ruslanda inĝeniero, programisto kaj esperantisto; Esperanto-instruisto, fondinto de la eldonejo “Verda Kukolo” ĉe kiu aperis pluraj libroj kaj broŝuroj, inkluzive de liaj propraj verkoj: “Plumprovo” (1994), “Ne stumblu ĉe gramatiko!” (1995), “Эсперанто-русский словарь ложных друзей переводчика” (1995), “Dialogoj pri religio” (1997), “Soci-politikaj konceptoj de L. L. Zamenhof” (1997), “Poltergejst’ ne kulpas” (1999), “Esperanto: demandoj kaj respondoj” (2004), “Folioj” (2011) k. a.

10. Antaŭ 65 jaroj mortis **Louis Bastien** (1869-1902-1961), franca armeano, generalo kaj esperantisto; vicprezidanto de la franca landa asocio SFPE (1928-44), prezidanto de UEA (1934-36), post la skismo en 1936 prezidanto de Internacia Esperanto-Ligo (1936-47), ĉefkunlaboranto de “Enciklopedio de Esperanto”, aŭtoro de “Naŭlingva etimologia leksikono de la lingvo Esperanto” (1907), “Vocabulaire de poche français-Esperanto” (1932) kaj “Militista vortareto” (1955). Membro de la Lingva Komitato (1909-48) kaj Akademio de Esperanto (1934-57), honora prezidanto de UEA (1947-61).

- Legu pli en la enciklopedio “Nia Diligenta Kolegaro”, p. 28-29.

11. Antaŭ 110 jaroj dum la batalo ĉe Verdun pro obusa trafo pereis **Théophile Rousseau** (pron.: rusó, 1876-1905-1916), franca profesoro de matematiko, disvastiganto de Esperanto, precipe en turismo, iniciatoro de Esperanto-oficejoj; kuniniciatoro, defondiĝa komitatano kaj vicprezidanto de UEA.

16. Antaŭ 40 jaroj mortis **Veselin Damjanov** (Дамянов, 1925-1974-1986), bulgara opera kaj opereta kantisto, profesoro en Bulgara Ŝtata Filharmonio, laŭreato de pluraj muzikaj premioj, Merita Artisto de Bulgario; li plurfoje koncertis en Esperantaj kongresoj kaj kantis en Esperanto dum siaj turneoj. Inter liaj diverslingvaj muzikaj registraĵoj estas ankaŭ kelkaj en Esperanto: “Veselin Damjanov kantas en Esperanto” (disko, 1978), “Serenado al fraŭlino Loli kaj kvar aliaj kantoj” (disko, 1981), “Papageno kaj du grandaj arioj” (kun Agathe Soemer-Pascali, disko, 1982), “Veselin Damjanov koncertas en Kanado” (kasedo, 1985), “Jubilea koncerto” (disko, 1985), “Emocioj” (kun Joëlle Rabu, posteume eldonita KD, 2014).

21. Antaŭ 80 jaroj naskiĝis **Gunnar Gällmo** (1946-195?-2023), sveda tradukisto, budhano kaj esperantisto, prezidanto de Budhana Ligo Esperantista; aŭtoro de "Wolfgangler" (1990), "Mokrokalvo la gigantegegego" (1999), "Kelkaj faktoj pri la budhismo" (2002), "Kantoj de la veraj homoj" (2006); tradukinto de "La Dharmo-pado" (2002), "Nemeza" (A. Nobel, 2003), "La korto" (K. Lundberg, 2015), "Malvarma bufedo" (J. Wrangborg, 2017).

25. Antaŭ 160 jaroj naskiĝis **Carlo Bourlet** (pron.: burlé, 1866-1900-1913), franca matematikisto, akademiano kaj esperantisto (N<sup>o</sup>6484); unu el la plej gravaj figuroj en la historio de Esperanto. Li interesigis pri Esperanto la amasan asocion Touring-Club kaj la prestiĝan eldonejon Hachette et Cie, prezidis la Parizan Esperanto-Grupon (la plej aktivan kaj amasan en la mondo), kunorganizis la unuajn UKojn, kunfondis kaj estis la unua sekretario de ISAE (1907); iniciatis kaj direktis "La Revuon" en kiu aperis ankaŭ liaj originalaj kaj tradukitaj verkoj; verkis librojn kaj broŝurojn en/pri Esperanto, inter kiuj elstaras "Premier manuel de la langue auxiliaire Esperanto" (1905), konata kiel "la ruĝa broŝuro", kies francaj eldonoj aperis en la suma eldonkvanto 550 mil ekz., kaj kiu aperis ankaŭ en pluraj alilingvaj versioj.

- Legu pli en la enciklopedio "Nia Diligenta Kolegaro", p. 44-46.

25. Antaŭ 115 jaroj naskiĝis **Károly Fajsz** (pron.: fájsi, 1911-1964-2004), hungara poŝt oficisto kaj esperantisto; kunfondinto de Esperanto-Asocio pri Poŝto kaj Telekomunikado (IPTEA); aŭtoro de Esperanto-lernolibro por hungaroj (1966), elstara Esperanto-kolektanto, kies kolekto enhavis 17 mil librojn, ok mil binditajn jarkolektojn de gazetoj k. m. a.; honora membro de UEA (1991); en 2002 lian kolekton aĉetis la kultura ministerio de Hungario kaj transdonis ĝin al la landa fremdlingva biblioteko en Budapeŝto.

- Legu pli en la enciklopedio "Nia Diligenta Kolegaro", p. 88-89.

25. Antaŭ 65 jaroj naskiĝis **Miĥail Konstantinoviĉ Ĉertilov** (Чертилов, 1961-1986-2018), sovetunia kaj ruslanda inĝeniero kaj esperantisto, plurfoja estrarano kaj unumandata prezidanto (2009-10) de REU, tradukinto de "Invado: Tero" (2012) de H. Harrison, kuntradukinto (kun S. Smetanina) de "La nokta patrolo" (2006-07) kaj "Kavaliroj de kvardek insuloj" (2009) de S. Lukjanenko.

- Legu pli en la artikolo "Malfruinta omaĝo" de Grigorij Arosev ĉe <https://sezonoj.ru/2019/02/chertilov/>

28. Antaŭ 105 jaroj naskiĝis **Elna Matland** (1921-1939-2011), norvega instruistino kaj esperantistino, prezidanto aŭ sekretario de la Esperanto-klubo en Bergeno kaj Sauda, estrarano de la Norvega Esperantista Ligo (NEL) kaj ĝia prezidanto (1985-91), komitatano de UEA (1983-95), prezidanto de LKK de la 76a UK en Bergeno (1991), honora membro de UEA (1992) kaj NEL (2001).

28. Antaŭ 45 jaroj mortis **Endre Tóth** (1931-1960?-1981), hungara muzikisto, instruisto, redaktoro, verkisto kaj esperantisto, blindiĝinta en 1945 pro eksplodo de mino; aŭtoro de verkoj hungaraj, germanaj kaj Esperantaj, kiuj aperis unu jaron post lia morto en la novelaro "Lappar, la antikristo" (1982), alte taksita de la kritiko kaj legantaro.

30. Antaŭ 105 jaroj naskiĝis **Juan Eduardo Bachrich** (denaske: Johann Eduard Bachrich, 1921-1938-2005), aŭstria agrikulturisto kaj esperantisto, post la Dua Mondmilito migrinta al Venezuelo, kie li estis peranto (1974-2001) kaj komitatano (1992-98) de UEA; subvenciinto de la vidkursoj "Mazi en Gondolando" kaj "Esperanto: Pasporto al la tuta mondo"; honora membro de UEA (2000). Danke al la donaco de liaj gefiloj UEA starigis la fondaĵon "Biblioteka Apogo Honore al la Geedzoj Maria kaj Johano Bachrich", kiu helpas pliriĉigi la kolektojn de Esperanto-bibliotekoj.

Aleksander Korĵenkov



## Nia Diligenta Kolegaro

Biografioj de 200 eminentaj esperantistoj

Verkis: Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov

Eldonis: *Sezonoj* kaj Litova Esperanto-Asocio

320 grandaj (enciklopedi-formataj) paĝoj

Portretoj, tabeloj kaj utilaj suplementoj

Prezo: 30 eŭroj

Mendu ĉe via kutima libroservo

<http://esperanto-ondo.ru/Knigi/Kniga120htm>

# *Kulturo*



**Antaŭ 250 jaroj, la 24an de januaro 1776 en Kenigsbergo (nun: Kaliningrado) naskiĝis Ernst Theodor Wilhelm Hoffmann (poste li anstataŭigis Wilhelm-on per Amadeus), germana verkisto, komponisto, pentristo kaj juristo, aŭtoro de pioniraj fantastaj kaj hororaj verkoj, el kiuj du aperas en la sekvaj paĝoj.**

# Nigra romantiko kaj sublima arto

de Wolfgang Kirschstein



Antaŭ 250 jaroj, la 24an de januaro 1776, naskiĝis en urbo, kies tiama nomo estis Kenigsbergo (Königsberg), unu el la plej grandaj verkistoj de la germanlingva literaturo. Nur 46 jarojn poste li mortis en Berlino. Liaj amikoj starigis tomboŝtonon por li: “E.T.W. Hoffmann, distingita en ofico, kiel poeto, kiel komponisto, kiel pentristo”.

Ŝajne por la amikoj lia burĝa kariero estis pli grava ol liaj atingoj en arto. Omaĝe al Mozart li ŝanĝis sian trian nomon. Ni konas lin kiel E.T.A. Hoffmann – Ernst Theodor Amadeus Hoffmann.

Kenigsbergo tiam ne plu havis gravan rolon en la centraliza Pruslando, ĝi fariĝis provinca urbo, kvankam Kantio opiniis, ke pro internaciaj komercaj rilatoj, universitato kaj najbareco de aliaj lingvoj kaj regnoj Kenigsbergo estis taŭga loko por akiri konojn pri homoj kaj la mondo. Tial li ne bezonis vojaĝi por esti informita pri la mondo. Reĝo Frederiko la Dua havis alian opinion: “Senagemo kaj enuo estas la patronoj de Kenigsbergo”.

La familianoj de Hoffmann estis juristoj en Kenigsbergo. La patro laboris ĉe la kortuma tribunalo. La edzeco kun lia kuzino ne estis tro feliĉa, ĉar ili divorcis, kiam Hoffmann estis nur dujara knabo, en 1778. Hoffmann neniam revidis sian patron.

La patrino ekloĝis kun la eta Ernst en la domo de sia patrino. Tie loĝis krome du onkloj kaj malsukcesinta onklo – ĉiuj fraŭloj. La patrino de Ernst estis sub la influo de sia propra, ŝajne tre extrema, patrino. La rolo de filino kaj patrino estis tro por ŝi, kaj ŝi suferis ofte de histeriaj plorspasmoj. Hoffmann devis kvazaŭ eduki sin mem sen respektenda figuro ĉirkaŭ si. En tio li vidis la kialon de *diversaj stultaĵoj*, kiujn li poste faris, kiam li jam estis oficisto, ekzemple karikaturoj de superuloj. Pruslandaj oficistoj ne estas konataj pro sia humuro. Tamen la memedukado de Hoffmann funkciis sufiĉe bone, ĉar li ĉiam restis en la limoj de burĝeco.

La patrino mortis en 1796, kaj la patro en 1797. Ambaŭ mortoj ne tro tuŝis lin. Ernst estis daŭre sub la kontrolo de la parencoj.

## VIVLONGA AMIKECO

En 1786 Ernst renkontiĝis kun Theodor Gottlieb Hippel (1775-1843). La familioj Hippel kaj Hoffmann estis najbaroj en Kenigsbergo. Hippel estis la plej fidela amiko de Hoffmann. La lastan fojon ili renkontiĝis nelonge antaŭ la tro frua morto de Hoffmann. La familio de Hippel estis nobela, kaj ne estis evidente, ke la juna Hippel fariĝu ŝtatoficisto. Jam en la lernejo montriĝis la talento de Hoffmann por muziko kaj pentrado. Sed li neniel estis mirinfano. Kvankam li ankoraŭ ne atingis ion kontentigan, li jam havis konsiderindan memestimon. En letero de 1795 li skribas al Hippel: “mi sentas, ke mi havas iom da valoro”.

Provizore li sekvis la kutimon de la familio kaj ekstudis juron en 1792. Arto estis ŝatokupo.

## GRANDAJ ENAMIĜOJ

Dum sia tuta vivo Hoffmann havis la talenton enamiĝi al *maloportunaj* virinoj. La unua granda tiuspeca amo estis Dora Hatt. Ŝi jam estis patrino de kvin infanoj kaj dek jarojn pli aĝa ol Hoffmann. La biografoj aldonas, ke ŝi estis “ankoraŭ bela”. La edzo kaj ŝi ekloĝis en la domo de la avino, kaj Hoffmann instruis ŝin pri kantado kaj pianludado. Sinjoro Hatt estis taksita kiel “nesolida”, kaj Dora ne estis tro feliĉa en tiu geedzeco. Ŝi koketis kun la studento Ernst. Estis ankaŭ alia amindumanto, kaj Hoffmann kaŭzis skandalon kun tiu rivalo en Kenigsbergo. Poste, kiam li verkis la rakonton “Das Majorat”, Hoffmann komprenis la ridindan aspekton de tiu afero.

La familio zorgis pri translokiĝo de Hoffmann al Glogau en Silezio, kie loĝis liaj onklo kaj baptopatro. En 1798 li sekvis la onklon al Berlino.

En Glogau Hoffmann okupiĝis pli pri pentrado. Li ankaŭ verkis du ampleksajn romanojn, kies manuskriptoj perdiĝis. Sed li ankaŭ havis dubojn pri siaj talentoj kaj konstatis malvigliĝon de la arta impeto. Li plendas pri “mortiga enuo” kaj “sento de vakuo”. En arto li daŭre estis nur diletanto, kaj decidis antaŭenigi sian karieron kiel juristo. Li studis intense kaj ekzameniĝis kun la rezulto “ĉie tre bone”. Nun li aspektis solide en la okuloj de la familio kaj por konfirmi tiun staton li decidis fianĉiĝi. La fianĉino estis la pli juna filino de la onklo, Minna Doerffer. Estis fianĉigo sen amo, simple aranĝo de prudento. En 1800 li sukcesis en la tria kaj fina ekzameno kaj fariĝis asesoro en Poznano.

**Ĝi estas demonstra versio de la 108-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# E. T. A. Hoffmann

## LA SABLOVIRO

### Nathanael al Lothar

Certe vi ĉiuj plene maltrankviliĝas, ĉar mi tiom longe-longe ne skribis. La patrino probable koleras kaj Klara eble supozas, ke mi ĉi tie vivas en senzorga lukso kaj forgesis mian ĉarman anĝelon, kiu tiom profunde estas plenplene gravurita en miaj menso kaj penso. – Sed ne estas tiel; ĉiutage kaj ĉiuhore mi pensas pri vi ĉiuj, kaj en dolĉaj sonĝoj la afabla figuro de mia ĉarma Klarinjo preterpasas min kaj ridetas al mi per siaj klaraj okuloj, kiel ŝi kutimis, kiam mi vizitis vin. – Ho! Kiel mi kapablas skribi en la nuna disŝirita stato de mia menso, kiu perturbas miajn pensojn! Io horora eniris mian vivon! – Tenebraj antaŭsentoj de terura sorto minacantaj min sterniĝas kiel nigraj nubaj ombroj super mi, penetreblaj de neniu afabla sunradio. – Nun mi diru al vi, kio okazis al mi. Mi devas, tion mi komprenas, sed nur pensante pri tio, ĝi kvazaŭ freneze eksplodridas el mi. – Ho, karega Lothar, kiel mi do iel kapablas sentigi al vi, ke tio, kio okazis al mi antaŭ kelkaj tagoj, vere povis detrui tiom malamike mian vivon! Se vi estus ĉi tie, vi povus vidi mem, sed nun vi eble pensas, ke mi estas stulta fantomspektanto. – Do bone, la hororaĵo, kiu okazis al mi, kaj kies mortigan impreson mi vane klopodas eviti, estas simple, ke antaŭ kelkaj tagoj, precize la 30an de oktobro, tagmeze je la 12a, vendisto de barometroj eniris mian ĉambron kaj ofertis siajn varojn. Mi aĉetis nenion kaj minacis elĵeti lin sur la ŝtuparon, post tio li tamen foriris mem.

Vi suspektas, ke nur tre malbanalaj rilatoj, kiuj profunde traplektas mian vivon, povas doni signifon al tiu incidento, ke la persono de tiu sensukcesa etkomercisto tiom malamike efikas al mi. Efektive estas tiel. Kun plena forto mi bridis min, por trankvile kaj pacience rakonti al vi tiom el mia frua juneco, ke en via vigla menso ĉio aperu en brilaj bildoj klare kaj detale. Ekkomencante mi aŭdas vin ridi kaj Klaran diri: “Tio ja estas nur infanaĵoj!” – Ridu, mi petas vin, priridu min plenkore! Mi tre petas vin! Sed Dio en la Ĉielo! Miaj haroj hirtiĝas kaj mi estas kvazaŭ en freneza malespero, ke mi petegas vin priridi min kiel Franz Moor petegis Danielon<sup>1</sup>. Nun ek al la afero!

Krom dum tagmanĝoj ni, mi kaj miaj fratinoj, nur malofte vidis la patron dumtage. Certe li estis tre okupita per sia ofico. Post la vespermanĝo, kiu laŭ malnova kutimo estis surtabligita jam je la sepa, ni ĉiuj iris kun la patrino en la laborĉambron de la patro kaj sidiĝis ĉirkaŭ ronda tablo. La patro fumis tabakon kaj trinkis grandan

glason da biero. Ofte li rakontis multajn mirigajn historiojn kaj tiom fervoriĝis, ke la pipo daŭre estingiĝis kaj mi devis tenante brulantan paperon rebruligi ĝin, kio do estis por mi ĉefamuzaĵo.

Sed ofte li donis bildlibrojn en niajn manojn, sidis mute kaj senmove sur sia fotelo kaj blovis fortajn vapornubojn, ke ni ĉiuj kvazaŭ naĝis en nebulo. Dum tiuj vesperoj la patrino estis ege malĝoja kaj tuj kiam la horloĝo batis la naŭan ŝi diris: “Nu infanoj – al lito! al lito! la sabloviro venas, mi jam sentas tion.” Mi vere ĉiufoje tiam aŭdis, ke iu per pezaj, malrapidaj paŝoj brue iris supren la ŝtuparon; tiu devis esti la sabloviro. Iun fojon tiu obtuza paŝado kaj bruado estis aparte horora, kaj kiam ŝi forkondukis nin, mi demandis la patrino: “Aĥ, panjo, kiu do estas tiu malica sabloviro, kiu forpelas nin de paĉjo – kiel li aspektas?” – “Neniu sabloviro ekzistas, kara infano”, respondis la patrino, “kiam mi diras, ke la sabloviro venas, tio signifas nur, ke vi estas dormemaj kaj ne plu kapablas teni la okulojn malfermaj, kvazaŭ iu estus ĵetinta sablon en ilin.” – La respondo de la patrino ne kontentigis min, kaj en mia infaneca animo kreskis klare la penso, ke la patrino forneas la sabloviron nur por ke ni infanoj ne timu lin, mi ja ĉiam aŭdis lin supreniri la ŝtuparon. Plena de scivolemo por ekscii pli pri tiu sabloviro kaj lia rilato al ni, la infanoj, mi fine demandis la maljunan virinon, kiu vartis mian plej junan fratinon: kiu do estas tiu sabloviro. “Nu, Natĉjo”, ŝi respondis, “ĉu tion vi ankoraŭ ne scias? Li estas malica, maljuna viro, kiu iras al la infanoj, kiuj ne volas enlitiĝi, kaj ĵetas manplenojn da sablo en la okulojn, ĝis ili sange elsaltas el la kapo, kaj li ĵetas ilin en la sakon kaj portas ilin sur la duonlunon kiel manĝon al siaj infanetoj; ili sidas tie en la nesto kaj havas kurbajn bekojn, kiel strigoj, per kiuj ili forbekas la okulojn de malobeemaj hominfanetoj.” – Koŝmara bildo formiĝis en mi pri la figuro de la kruela sabloviro; tuj kiam li vespere brue supreniris mi tremis pro timo kaj hororo. La patrino povis eligi el mi nenion pli ol la larmoplenan balbutaĵon: “La sabloviro! La sabloviro!” Subite mi kuris en la dormoĉambron kaj la tutan nokton torturis min la abomena aĉaĵo de la sabloviro. – Mi estis jam sufiĉe aĝa por kompreni, ke la sabloviro kun sia infanesto sur la duonluno, pri kiu rakontis la vartistino, ne povis esti tute vera; tamen la sabloviro daŭre restis por mi abomena fantomo kaj hororo – teruro kaptis min, kiam mi aŭdis lin ne nur supreniri la ŝtuparon, sed ankaŭ impete ŝirmalfermi la patran ĉambropordon kaj eniri. Foje li longe forestis, foje li venis en sufiĉe ofta sinsekvo. Tio daŭris dum jaroj, kaj mi ne povis alkitimiĝi al la terura fantomo, la imago de la feroĉa sabloviro ne paliĝis en mi. Lia interrilato kun la patro komencis okupi pli kaj pli mian fantazion: demandi pri tio la patron malhelpis nesuperebla timo, sed mem – mem esplori la sekreton, vidi la fabelecan sabloviron, tiu emo pli kaj pli dum jaroj ekĝermis en mi. La sabloviro gvidis min al la vojo de ĉio mirinda kaj aventura, kio facile nestiĝas en infaneca menso. Nenion mi ŝatis pli ol aŭdi kaj legi horror-rakontojn pri koboldoj, sorĉistinoj, dikfingruloj; sed ĉion superis la sabloviro, kiun mi desegnis en la plej kuriozaj kaj abomenaj figuroj sur tabloj, ŝrankoj kaj muroj per kreto aŭ karbo. Kiam mi fariĝis dekjara,

la patrino transigis min el la infanĉambro en kamereton, kiu estis ĉe la koridoro proksime al la ĉambro de la patro. Daŭre ni devis rapide malaperi, kiam je la naŭa bato de la horloĝo tiu nekonato estis aŭdebla en la domo. En mia kamereto mi aŭdis, kiel li eniris al la patro, kaj baldaŭ mi kvazaŭ sentis delikate strangodoran vaporon disvastiĝi tra la domo. Kune kun la scivolemo kreskis mia kuraĝo iel konatiĝi kun la sabloviro. Ofte mi rapide ŝteliris el la kamereto al la koridoro, kiam la patrino estis preteririnta, sed nenion mi povis subaŭskulti, ĉar ĉiam la sabloviro jam estis enirinta tra la pordo, kiam mi atingis la lokon, de kie mi povus vidi lin. Finfine, puŝite de nerezistebla urĝo, mi decidis kaŝi min en la ĉambro de la patro kaj atendi tie la sabloviron.

Pro la silento de la patro kaj la malĝojo de la patrino mi sentis iun vesperon, ke la sabloviro venos; tial mi ŝajnis grandan lacecon kaj forlasis jam antaŭ la naŭa la ĉambro kaj kaŝis min proksime al la pordo en iu kaŝangulo. La dompordo knaris, tra la koridoro iu venis per malrapidaj, pezaj, obtuzaj paŝoj al la ŝtuparo. La patrino preterrapidis kun mia fratino. Mallaŭte-mallaŭte mi malfermis la patran ĉambropordon. Li sidis kiel kutime mute kaj senmove kun la dorso al la pordo, li ne rimarkis min, tiel rapide mi englitis malantaŭ la kurtenon tiritan antaŭ la malfermita ŝranko, kie pendis la vestaĵoj de la patro. – Proksime, ĉiam pli proksime tondris la paŝoj – ekstere aŭdiĝis stranga tusado kaj skrapado kaj grumblado. Mia koro tremis pro timo kaj atendo. – Apud, apud la pordo abruptaj paŝoj – forta bato sur la klinko, la pordo ĵete malfermiĝas! – Perforte mi superas mian timon kaj singarde rigardas. La sabloviro staras meze en la ĉambro antaŭ mia patro, la hela brilo de la lumoj flamas al lia vizaĝo! – La sabloviro, la terura sabloviro estas la maljuna advokato Coppelius, kiu foje tagmanĝas ĉe ni!

Sed la plej hida fantomo ne povus teruri min pli ol ĝuste tiu Coppelius. – Imagu altan larĝaŝultran viron kun senforma granda kapo, terflava vizaĝo, densaj, grizaj brovoj, sub kiuj paro de verdecaj katokuloj pike flagras, granda, forta nazo kurbiĝanta ĝis la supra lipo. La oblikva buŝaĉo ofte tordiĝas al moka rido; tiam videblas sur la vangoj kelkaj malhelruĝaj makuloj kaj stranga akre fajfanta sono eliĝis tra liaj kunpremitaj dentoj. Coppelius ĉiam aperis en malnovmode fasonita cindrogriza mantelo, samkolora kamizolo kaj simila kuloto, sed kun nigraj ŝtrumpoj kaj ŝuoj kaj bukaj kun ŝlifitaj ŝtonoj. La eta peruko apenaŭ kovris ĝis la verto, la glubukloj staris alte super la grandaj ruĝaj oreloj, kaj granda, fermita harsaketo elstaris el la nuko, tiel ke eblis vidi la arĝentan bukon, kiu fermis la falditan kolumon. La tuta figuro estis plene aĉa kaj abomena, sed antaŭ ĉio por ni infanoj la grandaj ostecaj harkovritaj manoj estis abomenaj, tiel ke ni ne plu ŝatis tion, kion li tuŝis per ili. Li ja rimarkis tion, kaj estis lia plezuro tuŝi sub iu preteksto ajnan peceton de kuko aŭ dolĉan frukton, kiun nia bona patrino kaŝe metis sur niajn telerojn; kaj ni kun larmoj en la okuloj ne plu kapablis ĝui tion pro naŭzo kaj abomeno. Same li faris, kiam la patro dum festotagoj verŝis por ni etan glason da dolĉa vino. Tiam li rapide tuŝis ĝin per siaj manoj aŭ kondukis la glason al siaj bluaj lipoj kaj ridis diable, kiam

ni povis esprimi nian ĉagrenon nur per mallaŭtaj plorsingultoj. Li kutimis nomi nin etaj bestioj; ni ne rajtis eligi ajnan sonon kiam li ĉeestis, kaj ni malbenis la aĉan, malamikan viron, kiu zorge kaj intence forprenis de ni nian etan ĝojon. Ŝajne la patrino same kiel ni ankaŭ malamis la abomenan Coppelius, ĉar tuj post lia apero ŝia gaja senzorga humoro transformiĝis al malgaja, morna seriozemo. Tamen la patro kondukis, kvazaŭ li estus pli alta estaĵo, kies kapricon oni devas toleri kaj kies bonhumoro estis ĉiumaniere konservenda. Li bezonis nur doni etan aludon, kaj oni kuiris liajn ŝatatajn manĝaĵojn kaj servis rarajn vinojn.

Kiam mi nun vidis tiun Coppelius, mia animo terurite komprenis, ke neniu alia ol li povus esti la sabloviro, sed la sabloviro por mi ne plu estis tiu ĥimera timigilo el la vartistina fabelo, kiu portas al la luna strigonesto infanajn okulojn kiel manĝaĵon – ne! – malbela, fantomeca aĉulo, kiu ĉie, kie li aperas, alportas aflikton – mizeron – portempan, eternan pereon.

Kvazaŭ sorĉo min senmovigis. Sub la timo esti malkovrita kaj severe punita, mi restis malantaŭ la kurteno kaj subaŭskultis. Mia patro solene akceptis Coppelius-on. “Ek al la laboro!”, vokis tiu per raŭka, knaranta voĉo kaj forĵetis la mantelon. La patro kviete kaj sombre forprenis sian noktan negliĝon kaj ambaŭ surmetis longajn, nigrajn kitelojn. Mi ne vidis, de kie ili prenis *tiuajn*. La patro malfermis la pordon de murŝranko, sed mi vidis ke tio, kion mi tiel longe supozis murŝranko, estis ne tio, sed nigra truo, en kiu staris eta forno. Coppelius aliris kaj blua flamo



kraketis alten el la forno. Ĉiuspecaj strangaj iloj staris dise. Ho Dio! – kiam mia maljuna patro kliniĝis al la fajro, lia aspekto tute ŝanĝiĝis. Terura, spasma doloro ŝajne tordis liajn mildajn honestajn trajtojn al malbela, abomena diabla grimaco. Li similis al Coppelius. Tiu svingis la arduĝan tenajlon por preni helbrilantajn amasojn el la densa fumo kaj martelis ilin vikle. Estis kvazaŭ homvizaĝoj videbliĝis ĉirkaŭe, sed anstataŭ okuloj kun aĉaj profundaj nigraj kavoj. “Okulojn donu, okulojn donu”, li kriis per obtuze resona voĉo. Mi terurite ŝrikis kaj renversiĝis el mia kaŝejo planken. Coppelius kaptis min. “Eta bestio! – eta bestio!” li mekis montrante siajn dentojn, tiris min alten kaj ĵetis min sur la fornnon tiel, ke la flamo brulvundis miajn harojn. “Nun ni havas okulojn – okulojn – belan paron da infanaj okuloj”, li flustris kaj prenis per sia mano arduĝajn grajnoj el la flamo kaj intencis ŝuti ilin en miajn okulojn. Sed mia patro levis petante la manojn kaj diris: “Majstro! Majstro, lasu al mia Nathanael la okulojn – lasu ilin al li!” Coppelius ekridis grince kaj diris: “Do, la knabo konservu siajn okulojn kaj plorante portu sian ŝarĝon tra la mondo, sed nun ni bone observu la mekanismon de liaj manoj kaj piedoj.” Kaj jen li tiel perforte prenis min, ke la artikoj krakis, kaj li malŝraŭbis miajn manojn kaj piedojn kaj remetis ilin jen tien jen ĉi tien. “Tamen tio ne estas taŭga, estas pli bone kiel estis! – La maljunulo komprenis tion!” Tiel siblis kaj lispis Coppelius, sed ĉirkaŭ mi ĉio nigriĝis kaj obskuriĝis, abrupta spasma fulmis tra miaj nervoj kaj ostoj – mi nenion plu sentis. Milda, varma spiro glitis super mia vizaĝo, mi vekigis kvazaŭ el mortodormo. La patrino klinis sin super min. “Ĉu la sabloviro ankoraŭ ĉeestas?” mi balbutis. “Ne, mia kara infano, li foriris jam delonge, delonge, li ne damaĝos vin!” diris la patrino kaj kisis kaj karesis sian regajnititan karulon.

Kial mi lacigu vin, karega Lothar! Kial mi rakontu abunde detalojn, dum restas tiom multe por diri? Sufiĉas! – mi estis malkovrita dum mia gvatado kaj molestita de Coppelius. Timo kaj hororo kaŭzis severan febron, kiu malsanigis min por kelkaj semajnoj. “Ĉu la sabloviro ankoraŭ ĉeestas?” estis mia unua sana parolo kaj signo de mia resaniĝo kaj savo. – Mi ankaŭ rakontu al vi la plej teruran momenton de miaj junaĝaj jaroj; tiam vi estos konvinkita, ke ne la malkapableco de miaj okuloj kaŭzas ke ĉio aperas senkolora al mi, sed ke tenebra sorto pendas kiel malklara ombrovualo super mia vivo kaj ke eble nur mia morto povos disŝiri ĝin.

Coppelius ne plu aperis, onidire li forlasis la urbon.

**Ĝi estas demonstra versio de la 108-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# *La knabineto kiu miaŭis*

**de Laure Patas d'Illiers**



Ĉio komenciĝis kiam ŝmirpano falis. Ĝi estis kovrita de abrikota marmelado kaj inverse falis. Kiam la knabineto prenis la ŝmirpanon, restis orkolora makulo sur la blankaj kaheloj de la kuirejo. La knabineto forĵetis la ŝmirpanon rubujen kaj flustris “Miaŭ”. Ĉirkaŭ la tablo neniu rimarkis tion. La patrino prizorgis la bebon kaj la du pli aĝajn fratojn, kiuj manĝis kaj plenbuŝe krikverelis.

Malantaŭ la domo estis malvasta ĝardeno. En la heĝo multis truoj, kie videblis kampoj ĝis fora arbaro. La knabineto pasigis multe da tempo en la ĝardeno, krom kiam pluvis, kio oftis pro la printempo. La antaŭan semajnon la knabineto vidis en kaveto, piede de la heĝo preskaŭ nevideblan sub la foliaro katinon kun ĝiaj katidoj. La katino senmove kuŝis kun duonfermitaj okuloj. Kvar malgrandaj harbuloj algluiĝis al ĝia blanka ventro. La tuta kata familio havis la saman silkan felon, kun strioj grizaj kaj blankaj. Longtempe la knabineto kaŭris rigardante la mamsuĉadon.

La postan tagon la knabineto matenmanĝis per la kutimaj ŝmirpanoj. La fratoj kiel kutime manĝis kaj plenbuŝe kverelis inter si. Fine de la matenmanĝo funde de ŝia bovlo restis ĉokolado. Per fingro, ŝi desegnis al si katan lipharon. Ŝi eldiris: “Miaŭ”. La patrino diris: “Rapidu knaboj, estas tempo foriri”.

La knabineto iris rigardi la katojn piede de la heĝo. La katino lekis siajn kvar katidojn, unu post la alian. Ĝia rozkolora lango karesis laŭlonge de la tuta korpo de la katido. Kiam la lango pasis sur ĝia muzelo, la katido tute fermis la okulojn kaj levis la kapon.

Unu vesperon la knabineto deprenis de sur la planko ĵurnalon lasitan de ŝia patro. Per kolorkraĵonoj, sur ĉiu paĝo apud la paĝnumero, ŝi desegnis katajn orelojn kaj katajn lipharojn.

**Ĝi estas demonstra versio de la 108-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# *Instruisto Luka*

**de Paulo S. Viana**



Instruisto Luka zorge ŝlosis la pordon de sia modesta domo, atente enpoŝigis la ŝlosilojn, kaj ritmopaŝe ekiris al la biblioteko. Lastatempe li rimarkis, ke li estas iom distriĝema, kaj se li perdos la ŝlosilojn, jen grava ĝenaĵo. Instruisto Luka pensiĝis precize antaŭ unu jaro. Dum tridek jaroj li instruis konsciencie kaj sindediĉe al infanoj en publika lernejo. Li malofte mankis en siaj devoj, li klopodis eduki la etulojn, malgraŭ ĉia indiferenteco flanke de la gepatroj, de la gekolegoj, de la estroj de la lernejo, ŝajne de la socio mem, kiu verŝajne tute ne interesiĝas pri tiu nebula agado: eduki. Kio rezultis? Nur tridekjara tempoperdo. Infanoj, kiuj ne sufiĉe lernis, lernejoj, kiuj nesufiĉe lernigas, politikistoj neinteresitaj pri edukado, kolegoj akomodigitaj al pigra burokratieca plenumado de siaj apenaŭaj taskoj.

Instruisto Luka jaron post jaro akiris al si la konscion, ke lia eduka laboro estas tute vana kaj senfrukta. Lernejoj nur ŝajnigas lernigi, instruistoj nur ŝajnigas instrui, lernantoj malhonestas dum ekzamenoj, familianoj neglektas siajn idojn – kaj instruisto Luka malestime komencis rigardi sin kiel eron en granda maŝino de trompado, kiu estas la eduka sistemo en lia lando. Post tridek jaroj da maldeca aktorado li fine pensiĝis, li rajtis por la cetero de sia vivo ricevi modestan pagon. Li ne plendis. Almenaŭ nun li estis libera de tiu farso, en kiun li implikiĝis kaj el kiu li neniam kuraĝis eskapi.

Fakte, instruisto Luka havis la pezan konsciencon, ke li dum sia tuta profesia vivo partoprenis en falsa laboro, kiel falsa edukisto. Fine de sia kariero, li ne sukcesis memori eĉ unu lernanton, pri kiu li havis informon, ke li fariĝis sukcesa civitano, progresinta plenkreskulo. Li konsideris sin profesia fiasko, eĉ pli severe: preskaŭ malhonesto kunkrimulo.

Kontraŭ tia sento de kulpo, instruisto Luka organizis sian pensiulan vivon surbaze de konstante kaj tute egale plenumataj rutinaĵoj. Rutino protektas kontraŭ memakuzoj. Li enlitiĝis kaj ellitiĝis, kaj manĝis, kaj sin banis ĉiam en fiksitaj horoj. Ĉiudimanĉe, dum la mateno, li skribis per bela instruista manskribo leteron al malnova korespondamiko en Pollando, raportante pri pasintaj travivaĵoj, kiujn

li rememoris el sia juna aĝo. Tiujn leterojn li verkis en Esperanto – instruisto Luka lernis Esperanton, kiam li estis ankoraŭ adoleskanto, kaj ankoraŭ nutris idealismajn ideojn. Vere, lia pola amiko estis nun lia sola amiko. Li ne konsideris sin inda je la amikeco de aliaj homoj. La homoj ĝenerale aspektis al li kiel granda amaso da nefidindaj, nefidemaj uloj. Kaj edzinon li neniam kuraĝis alpreni.

Unu el liaj rutinaĵoj, ekde la unua tago post lia pensiigo, estis ĉiumatena frekventado de la publika biblioteko. Post la matenmanĝo li dum precizaj dek kvin minutoj piediris ĝis arboplena placo, kie staris la malnova konstruaĵo. Li salutis la arbojn, envenis, eksidis en la legejo kaj dum unu horo senĉese kaj atente legadis. Li decidis legi klasikajn verkojn. Li komencis per “Donkiĥoto”, kiun li jam estis leginta en frua juneco, kaj kiu lasis profundan impreson en lian spiriton. Nun li ĉiutage legis po dudek paĝojn, per okuloj de elreviĝinto; tute alia legado, farata de tute alia leganto, per tute aliaj okuloj kaj kompreno – sed nepre ankoraŭ sufiĉe donkiĥota.

“Hodiaŭ mi devas festi, – li pensis. – De unu jaro mi estas libera por miaj ĉiutagaĵoj, sen la devo frekventi la lernejon”. Li estis promesinta al si mem, ke li neniam plu eniros la lernejon.

Dum dek minutoj li haltis ĉe simpla drinkejo kaj petis glaseton da vino. Ruĝa, seka vino. Li rapide trinkis ĝin kun sento de solena memgratulo. Kaj li rapidis al la biblioteko, kien li alvenos dek minutojn malfrue. Hodiaŭ li decidis relegi la epizodon de la batalo de la hidalgo kontraŭ ventmueliloj. Strangaĵo. Supozi, ke mueliloj estas atakindaj malamikoj ĉiam sonis al li kiel absoluta, senlima sensencaĵo, tamen kaŝanta ian misteron. Genia sensencaĵo. Kaj post ĉiu relegado de tiu ekstravaganca epizodo, instruisto Luka ne povis eviti demandon: “Ĉu mi iam impetis kontraŭ mueliloj?”

Precize post unuhora legado li ekstaris kaj foriris. La mateno estis hela, la ĉielo blua, kaj la arboj aspektis eĉ pli ridemaj kaj simpatiaj ol kutime. Malmultaj homoj sidis sur benkoj, en ombro.

Ĉar tiu estis jubilea tago, li decidis dum kelkaj minutoj sidi en la agrabla ombro, kie blovis milda venteto. Jubileo meritas escepton. Li profunde spiris kaj provis revizii sian unuan jaron de la pensia vivo. Ĉu li estis pli feliĉa nun? “Nu, feliĉo estas tro aŭdaca vorto”, li tuj alĝustigis sian misdemandon. “Eble kontenta”.

Li kontemplis la diversajn arbojn en la placo, kaj provis elekti la plej belan, la plej imponan, la plej densfolian. Dum lia naiva konkurso, alproksimiĝis junulino kaj sidigis sur la sama benko. Ŝi estis maldika, iom pala, kun longaj nigraj haroj, modeste sed dece vestita. Ŝi rigidmiene rigardis antaŭen, enpensige, kvazaŭ ŝi fakte vidus nenion, krom siaj propraj pensoj. Longe ŝi sidis senmove.

**Ĝi estas demonstra versio de la 108-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# 67 libroj: La plej magra jarrikolto

Ekde sia renaskiĝo “La Ondo de Esperanto” ĉiujare publikigas statistikon de la libro-produktado en Esperantujo, daŭrigante la iniciaton de Vilmos Benczik en “Hungara Vivo”. Por tiuj malmultaj, kiuj unuafoje abonas “La Ondon”, mi ripetu kelkajn enkondukajn frazojn, kiujn prefere ne legu niaj konstantaj abonantoj.

La bazo de nia statistiko estas la rubriko “Laste aperis” (LA) de la revuo “Esperanto”, en kiu estas registrataj ĉiuj paperaj libroj, kiujn la libroservo de UEA ekvendis dum la aktuala jaro. Tia statistiko ja estas kritikebla kaj kritikinda.

Unue, en LA estas registrataj libroj, eldonitaj pli frue sed ekvenditaj de UEA en la koncerna jaro. Tio povas doni misan bildon pri la revuata jaro, sed la resuma statistiko glatigas la fluktuaĵojn kaj fidele vidigas la ĉefajn tendencojn en nia eldonado.

Due, la libroservo de UEA vendas ne ĉiujn novajn librojn, kaj en LA kutime mankas lerniloj eldonitaj por enlandaj bezonoj (ekzemple, lerniloj por ĉinoj) kaj etkvante eldonitaj broŝuroj, kiujn la aŭtoroj disvendas kaj disdonacas en siaj kluboj kaj renkontiĝoj. Same mankas en LA kongreslibroj, programbroŝuroj kaj jarlibroj, kiuj abunde aperas ne por vendado tra libroservoj, sed por disdono al la respektivaj kongresanoj kaj asocioj. Kaj kelkaj eldonejoj ne proponas siajn librojn al UEA.

Trie, ekster la statistiko restas la bitlibroj, kiujn oni ofertas sen zorgi pri paperaj eldonkostoj. Tio reduktas la paperan rikolton.

Sed mankas pli granda statistika bazo ol “Laste Aperis”. Vidu la rezulton.

	1991-2000	2001-2010	2011-2020	2021-2024	2025	91-2025 Sume aŭ averaĝe
Nombro de libroj en/pri Eo	2107	1913	1465	394	67	5.946
Suma paĝonombro	251.276	276.616	228.165	65.994	10.045	832.096
Averaĝa paĝonombro de libro	120,3	145,2	155,7	167,5	149,9	139,9
Averaĝa prezo de libro (eŭroj)	8,2	11,4	12,1	14,8	13,3	10,7
Lernolibroj, vortaroj k. s. pri Eo	296	307	172	22	6	803
Originala beletro	258	214	213	78	11	774
Traduka beletro	458	361	330	137	22	1308
Lingvistiko, esperantologio	229	211	174	30	2	646
Eo: historio, kulturo, movado...	241	299	173	41	8	762
Politiko, historio, socio	166	228	248	44	10	696
Scienco kaj tekniko	182	93	33	13	3	324
Religio	105	93	72	19	2	291
Aliaj temoj	172	107	50	8	3	340

Jaro	Libroj	Paĝoj	Jaro	Libroj	Paĝoj
1991	222	26.091	2008	158	25.381
1992	205	25.789	2009	158	24.272
1993	136	18.511	2010	204	28.232
1994	188	22.078	2011	172	19.775
1995	200	23.345	2012	153	23.144
1996	232	28.637	2013	178	25.344
1997	273	27.727	2014	107	14.024
1998	208	28.769	2015	172	25.629
1999	208	24.460	2016	189	32.323
2000	235	25.869	2017	139	23.353
2001	222	31.520	2018	127	19.483
2002	174	26.451	2019	150	28.194
2003	224	28.424	2020	78	16.906
2004	183	27.295	2021	106	16.088
2005	159	23.780	2022	100	15.871
2006	204	30.078	2023	100	19.116
2007	184	31.183	2024	88	14.919
			2025	67	10.045

En 2026 surmerkatiĝis 67 libroj, nova malrekordo. La ĝenra distribuo (vidu la tabelon en la antaŭa paĝo) rekonfirmas, ke nun aperas malmultaj lerniloj, ja nun oni pli lernas Esperanton rete, sed ne per paperaj lernolibroj). La plej popularaj plu estas tradukitaj beletraĵoj.

## Denove sen EAB. Sed tio ŝanĝiĝos en 2026

Ankaŭ malrekorde, nur 11 eldonejoj produktis almenaŭ du librojn jare. Mondial plu estas plej supre kun 12 libroj, inkluzive de “Beletraj Almanakoj”. Sekvas Dokumenta Esperanto-Centro kun sep libroj. La tria devintus esti Esperanto-Asocio de Britio kun kvar libroj, pri kiuj Tim Owen rakontas en ĉi tiu “Ondo” (p. 108-112), sed ilin LA ne menciis, tamen – jen, novaĵo! – du el ili estas en la februara LA por 2026.

### 2025. Libroj

Mondial (Usono)  
DEC (Kroatio)  
E. Macko (Hungario)  
Horizonto (Japanio)

12

7

3

3

### 2025. Paĝoj

Mondial

E. Macko

DEC

MSD

2119

1022

914

538

**Ĝi estas demonstra versio de la 108-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

# Ĉu tio estis ĉio?

Ĉiujare la sama proceduro. Mi diras al mi: ne, nun mi finfine flankenlasas la kuradon pri Oskar-premioj, sed kutime la scivolemo venkas. Kion ili trudis al ni en 2026? Kiel ano de internacia movado, mi aparte interesiĝas, kion ili elektis kiel la plej bonan internacian (t. e.: neanglalingvan) filmon. Mi parolos nur pri filmoj, kiujn mi efektive spektis.

## En Proksima Oriento multo nova

Kvin filmoj el la mallonga listo, publikigita en decembro, temis pri la Proksima Oriento; du ricevis nomumojn.

“Palestino 36” (Palestine 36) de Annemarie Jacir (proponita de Palestino) rakontas pri la origino de la konflikto el araba vidpunkto. La temo estas la Granda Araba Ribelo (de 1936 ĝis 1939) en Mandata Palestino. Jacir montras al ni, kiamaniere naskiĝas rezisto. Ĉi tie ne estas la loko por diskuti, ĉu ĝi estas historie akurata. Ĉu la britoj vere estis tiom krudaj rasistoj, kiel oficiro Orde Wingate en la filmo, aŭ ĉu tio estas karikaturo? Ĉiukaze estas necese, inde, grave meti sin en aliulan pozicion. Israelo ne ŝatas tion, kaj tie la filmo estas malpermesata. “Palestino 36” estas solide bona filmo. Renkonti aliajn vidpunktojn estas ĉiam bona afero.

Ankaŭ “Ĉio, kio postrestas de vi” (اللي باقي منك) de Jordanio atingis la mallongan liston. Ja estas sufiĉe por kritiki, sed ankaŭ estas gravaj argumentoj por spekti ĝin. Tiu filmo estis reĝisorita de Cherien Dabis kaj rakontas la historion de tri generacioj en Cisjordanio, de “nakba” ĝis “intifada” – du arabaj vortoj, kiuj danke al la senĉesa konflikto en la regiono apenaŭ bezonas tradukon. En 1988 la junulo Nur estis pafita de israela soldato en la kapon kaj mortis. La patrino turnas sin en la filmo rekte al la spektantoj, trarompante la “kvaran muron”, kaj diras, ke por plena kompreno necesas reveni al la avo de Nur. Jes, ankaŭ tiu filmo rakontas eventojn el la vidpunkto de la palestinanoj, jes la “cionistaj” okupantoj estas preskaŭ antisemitaj karikaturoj, sed tamen je la fino estas simbola repaciĝo, kiam la koro de Nur plubatas en la korpo de israelano. Bela kontrasto al tio, kion ni vidas, kiam ni aŭdacas ŝalti la televidilon por spekti novaĵojn.

“La voĉo de Hind Rajab” (صوت هند رجب), propono de Tunizio kaj reĝisorita de Kaouther Ben Hania estas hibrida filmo. La ĉefa parto estas kun profesiaj aktoroj, kaj veraj dokumentoj estas enmuntitaj. Mi devas konfesi, ke el ĉio, kion mi priparolas ĉi tie tiu filmo plej impresis min, preskaŭ ĝis emocia ŝoko. Mi ja povintus diri





al mi mem, ke estas “nur” filmo, sed tamen ne estas, ĉar la eventoj okazis la 29an de januaro 2024: Kvinjaraĝa Hind estas kaptita en veturilo, pafmortigitaj parencoj estas ĉirkaŭ ŝi. Hind vokas la Ruĝan Lunarkon kaj petegas ilin savi ŝin. Por sendi ambulancan la helpantoj bezonas la permeson de armeo. La administracio laboras malrapidege. La komunikado ne estas efika kaj plene de miskomprenoj. Mi konsentas kun la recenzanto de The Times: Politikistoj devus vidi ĝin. Ĉiuj, kiuj faras decidojn, devus vidi ĝin.

Cetere: ĉu vi rimarkis, ke ĉi tiuj tri filmoj estas reĝisoritaj de virinoj?

Jafar Panahi el Irano jam dum multaj jaroj faras filmojn sen permeso de la pastra reĝimo. “Estis nur akcidento” (یک تصادف ساده) estis filmita en Irano kaj finproduktita en Francio. Tial Francio proponis ĝin kiel plej bonan internacian filmon. “Estis nur akcidento” temas pri Vahid, kiu iam protestis por pli altaj salajroj kaj pro tio estis en malliberejo de la reĝimo. Li neniam vidis sian torturiston, sed post hazarda renkontiĝo li kredas, ke li trovis lin. Raŝid estas riparisto de veturiloj. Vahid forkaptas lin por venĝi sin, sed li ankaŭ dubas, ĉu Raŝid vere estas lia iama torturisto. Li konsultas aliajn prizonantojn, kaj okazas intensa psikologia dramo – ĝis la spirhaltiga lasta minuto. Kompreneble mi ne malkaŝas ĉi tie, kio okazas. Mi opinias, ke tio estas unu el la plej elstaraj filmoj de la jaro, sed por la elektantoj ĝi ne meritas premion, eĉ ne honoran mencion.

## Internacie kaj (tamen?) la plej bona?

La kategorio de internaciaj filmoj ĝenerale estas aparta, ĉar ili preskaŭ neniam aperas en la kategorio la “plej bona filmo”. Eble la internaciigo de la Akademio ŝanĝos tion estonte. En 2026 aperis almenaŭ du ne-holivudaj produktaĵoj en ambaŭ kategorioj. Estas iomete amuze, ke ili tamen havas referencojn al la kino de Holivudo.

“La Sekreta Agento” (O Agente Secreto) de Kleber Mendonça Filho kolektis eĉ kvar nomumojn, sed ricevis finfine nenion. 1977. Marcelo estas survoje al Recife por renkonti sian filon. Jam en la unua sceno ni vidas la koruptitecon de la polico, ĉar ĉe benzinstacio kuŝas jam dum tagoj kadavro. Pro la karnavalo ili ne emas forporti ĝin. Homa piedo estas trovita en ŝarko. La polico ne emas solvi tiun misteron, anstataŭe ili ĵetas la piedon denove en la maron.

**Ĝi estas demonstra versio de la 108-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

**Orienta  
Almanako**



Novelaro  
Tradukis diversaj  
80 paĝoj  
Kaliningrado: Sezonoj, 2018  
*Virtuala Biblioteko, №16*  
Prezo: 0,00 eŭroj

Elŝuti la libron:



Elŝutoj: 1239 Elŝutoj: 924

**El la rusa  
poezio**



Poemaro  
Tradukis Valentin Melnikov  
90 paĝoj  
Kaliningrado: Sezonoj, 2020  
*Virtuala Biblioteko, №17*  
Prezo: 0,00 eŭroj

Elŝuti la libron:



Elŝutoj: 10 Elŝutoj: 11

**Miĥail Korotkov  
Io devas okazi**



Originala  
novelaro  
117 paĝoj  
Kaliningrado: Sezonoj, 2020  
*Virtuala Biblioteko, №18*  
Prezo: 0,00 eŭroj

Elŝuti la libron:



Elŝutoj: 10 Elŝutoj: 11

**Paulo Sérgio Viana  
Dek du rakontoj**



Originala  
novelaro  
49 paĝoj  
Kaliningrado: Sezonoj, 2023  
*Virtuala Biblioteko, №22*  
Prezo: 0,00 eŭroj

Elŝuti la libron:



Elŝutoj: 1304 Elŝutoj: 940

## Ankoraŭ du senpagaj libroj en nia retejo

**El la rusa poezio** / Kompilis Valentin Melnikov kaj Aleksander Korĵenkov; Tradukis el la rusa Valentin Melnikov; Antaŭparolo kaj biografiaj notoj de Aleksander Korĵenkov. – Kaliningrado: Sezonoj, 2020. – 90 paĝoj. – (Literatura suplemento al “La Ondo de Esperanto”, 2019).

Korotkov, Miĥail Gavriloviĉ. **Io devas okazi**: Rakontoj, fabeloj, pripensoj / Postparolo de Aleksander Korĵenkov. – Kaliningrado: Sezonoj, 2020. – 117 paĝoj. – (Literatura suplemento al “La Ondo de Esperanto”, 2020).

La 18an de marto en nia retejo aperis du *novaj* bitlibroj: literaturaj suplementoj al “La Ondo de Esperanto”, kiujn la abonantoj de ĉi tiu gazeto senpage ricevis en la abonjaroj 2019 kaj 2020: antologio “El la rusa poezio” kaj originala novelaro “Io devas okazi” de Miĥail Korotkov. Nun ĉiu deziranto povas libere elŝuti ilin (laŭ la normoj pdf kaj ePub).

La 90-paĝa antologio “El la rusa poezio” entenas 101 verkojn de 22 rusaj poetoj el la 18a kaj 19a jarcentoj ekde Miĥail Lomonosov ĝis Konstantin Romanov. Ĉi tiuj tradukoj de Valentin Melnikov ekde julio 2007 ĝis aŭgusto 2015 estis publikigataj en la rubriko “Rusa Antologio” de “La Ondo de Esperanto”. Aldone en la bitlibra eldono estas publikigitaj kelkaj tradukoj, kiuj pro lokomanko ne povis esti presitaj en la papera “Ondo”.

La 117-paĝa novelaro “Io devas okazi” de la siberia esperantisto Miĥail Korotkov entenas 18 liajn “rakontojn, fabelojn kaj pripensojn”. Ses el ili aperis en lia *samizdata* novelaro “Homo, kiu mortigis” (Sverdlovsko: Sezonoj, 1988), kiu estis la unua originale Esperanta sciencfikcia kaj fantasta libro eldonita en Sovetunio; ilin komplementas ok verkoj poste aperintaj en la almanako “Sezonoj” (unu) kaj en “La Ondo de Esperanto” (sep) kaj kvar diverstempe verkitaj tekstoj pli frue ne publikigitaj.

Ekde januaro 2007 “La Ondo de Esperanto” havas bitversion (pdf), kaj ekde 2017 “La Ondo” jam la dekan jaron aperas nur elektronike (pdf, ePub). En februaro 2010 ni komencis eldoni bitlibrojn kaj publikigi ilin en la bitlibrejo de “Sezonoj” ĉe <https://esperanto-ondo.ru/Libro/Libro.php>. Nuntempe ĉi tie estas dudek du senpagaj bitlibroj, du aĉeteblaj bitlibroj (elŝuteblaj por konatiĝo kiel provlibroj), kaj ok numeroj de “La Ondo de Esperanto”.

La plej ofte elŝutita estas la romaneto “Blankaj Noktoj” de Fjodor Dostojevskij, tradukita de Grigorij Arosev. Oni elŝutis ĝin 11 mil 521 fojojn: 6470 pdf-versiojn kaj 5051 ePub-versiojn. Ĝin sekvas “La falo de la domo Usher” de Edgar Allan Poe tradukita de Edmund Grimley Evans (9910 elŝutoj) kaj du tradukoj de Aleksander Korĵenkov: “La pika damo” de Aleksandr Puŝkin (9769) kaj “Sveda alumeto” de Anton Ĉeĥov (9672).

Inter la gazetoj la plej populara estas la januara eldono de “La Ondo de Esperanto” por la 2017a jaro: ĝi estas elŝutita 12 mil 730 fojojn (7704 pdf + 5026 ePub).

Intertempe la abonantoj de “La Ondo” ricevis literaturajn suplementojn por 2021, 2022, 2023, 2024 kaj 2025, kiuj aperos en nia virtuala biblioteko kvin jarojn post la eldono.

Ni invitas ĉiujn legemulojn viziti nian bitlibrejon kaj elŝuti senpage niajn librojn kaj gazetojn ĉe <https://esperanto-ondo.ru/Libro/Libro.php>.

**Halina Gorecka**  
**Aleksander Korĵenkov**

## **Literaturaj suplementoj al “La Ondo de Esperanto”**

2017: Aleksandr Saĥarov. Superforta ambicio. 31 paĝoj.

2018: Orienta Almanako. 80 paĝoj.

2019: El la rusa poezio. 90 paĝoj.

2020: Miĥail Korotkov. Io devas okazi. 117 paĝoj.

2021: Anton Ĉeĥov. Malgranda trilogio. 39 paĝoj.

2022: Voltero. Kandido, aŭ Optimismo. 176 paĝoj.

2023: Ivan Turgenev. Versaĵoj en prozo. 56 paĝoj.

2024: Ivan Turgenev. Versaĵoj en prozo. II. 29 paĝoj.

2025: Henryk Sienkiewicz. Kien ci iras. 623 paĝoj.

# *Mozaiko*



Ĉi-foje nia deĵoranta humoristo Stano proponas manplendon da ŝercoj pri katoj – plej ŝatataj kaj dorlotataj dombestetoj. Iuj diras, ke ili estas la veraj mastroj de la homaj hejmoj...

# Miaŭ!

Mi komprenis, ke mia kato traktas min kiel dion. Do ĝenerale ĝi min ignoras, sed frontinte problemon ĝi tuj vokas min kaj postulas helpon.

Psikologoj solvis longdaŭran enigmon: kial kato longe kaj laŭte postulas malfermi pordon, sed poste ne eliras el la ĉambro. Ĝi simple deziras ke el la ĉambro eliru ĉiuj aliaj.

Fakuloj pri superstiĉoj ĝis nun diskutas, kio okazas se nigra kato transiris la vojon antaŭ iu, sed poste revenis? Ĉu ĝi nuligis la malbonan aŭguron aŭ duobligis ĝin?

Psikologoj sugestas: se vi konsideras vin la plej malfeliĉa, suferplena estaĵo en la mondo, forte brakumu la katon. Nun vi scias ke ankaŭ la kato suferas.

Edzino pelas la edzon kuŝantan sur sofo:

- Iru al kuirejo - mi aŭdas la katon brui!
- Sed ĉu vi nutris ĝin tagmeze?
- Ne.
- Do, ĉio estas en ordo - la kato kuiras!

Du katoj konversacias:

- Mi spektis en televida programo, ke katoj devenis de leonoj. Mi fieras senti min reĝo!
- Kaj mi de alia programo eksciis ke niaj mastroj devenas de... simioj!
- Dio mia, kia malhonoro...

Homoj ofte panikiĝas pro katoj kriantaj de sur arboj. Oni vokas fajrobrigadanojn, grimpas laŭ ŝtupetaroj ktp. Sed ĉu iu vidis iam ajn skeleton de kato surarbe?

Kiam mi dubas kion fari, mi demandas min: kion farus mia kato en tiu ĉi situacio? Kaj mi dormas plu...

- Kial via kato havas tiom strangan nomon Febro?
- Tre simple. Mi ne ŝatas mensogi, do kiam la ĉefo telefonas al mi por demandi, kial mi ne venis al la oficejo, mi honeste diras: "Mi ne povas ellitiĝi, mi kuŝas kun Febro..."

Du fraŭlinoj konversacias:

- Mi planas ekhavi katon.
- Ĉu vi certas? Kato estas tro serioza decido, tio ŝanĝos vian tutan vivon nerenverseble. Eble unue provu ekhavi edzon...

Plukis kaj tradukis **Stano Belov**

# **Spritaj splitoj kaj preskeraroj**

## ***El la kolekto de reduktoro***

### ***Akra sperto***

... veterano de la unua mondmilito... dormis multajn jarojn en la tranĉejoj... (William P. Vathis: La Okcidenta-Orienta akrido, Spokane: la aŭtoro, 1997, p. 33)

### ***TEJO kreskigas obezulojn***

... disvolvado de aktivuloj estas laboro de Aktivula maturigo... prepari edukan programon por vastaj Esperantaj aktivuloj estis unu al punktoj de Realigplano de TEJO. (KuboF Hromoslav, 13 jan 2026, <https://www.liberafolio.org/2026/01/13/la-almanako-de-uea-denove-prokrastita/#comment-12744>)

### ***Mise kaj fiŝe, lie kaj ŝie***

Fiŝo gravedigis unu edzinon de sia amiko kaj tiam fariĝis lia nova edzo. (Koko Saĝbadjelou: Togolando kulture, MSD - EKBP, p.s. ĈES, 2024, p. 19)

### ***Wtf, aŭ: de litro al litrego***

Se mi havas tekston en Wotf, facile mi grandigas la litrojn. (Stefan MacGill, uea-membroj, 23 aŭg 2025; trovis Valentin Melnikov)

### ***Kompleta senĉeniĝo***

En la jarlibroj aperis la listo de deligitoj. (Peter Weide, 3 jan 2026, <https://groups.io/g/uea-membroj/topic/117040725>)

### ***Piedpuŝa malprogreso***

... komunista reĝimo... sklavigas homojn kaj perskutas liberecon. (Roman Dobrzyński: Romano pri Romano, Varsovio: Pola Esperanto-Asocio 2025, p. 163)

### ***Ĉu moskitaj movoj aŭ literatura mortokulto?***

Ni... kuraĝigas vin partopreni en la kultura dialogo, kiu vivas en la paĝoj de Literatura Foiro. (HeKo 892 7-B, 3 nov 2025, <https://www.esperantio.net//heko/literatura-foiro-338-nun-presata>; trovis Ibrahim Bryzgaloff)

### ***Tre persona lingvaĵo***

Ĉi tiuj du versioj de la poemo estis tradukitaj en la Esperanton de Éva Tófalvy per Al. (Literatura Vivo, 2025, №6, p. 111)

### ***Ne nepre tra anuso***

... sen kunlaboro de eĉ ne perfekaj homoj, vi ne povos plenumi multon. (Tacuo Huĝimoto: Kromeseoj, Oosaka: Riveroj, 2009, p. 25)

Plukis **István Ertl**

## Perantoj de *La Ondo de Esperanto*

**Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekenstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

**Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 301, BR-70393-902 Brasília-DF, CEP 70.393-902. Rete: bel-abonservo@esperanto.org.br.

**Bulgario:** Georgi Mihalkov, «Nadejda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

**Ĉeĥio:** Jana Zikal. Rete: peranto@esperanto.cz.

**Ĉinio:** Zhang Yan, Linyi shi, lanshan qu, taihe huayuan, CN-276000, Shandong sheng. Rete: 122309267@qq.com.

**Finnlando:** EAF / Paula Niinikorpi. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

**Francio:** Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

**Germanio:** Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: abono@esperanto-buecher.de.

**Hungario:** Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapeŝt, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

**Hungario:** Eszperantó Alapítvány, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapeŝt. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

**Italio:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: feisegreteria@esperanto.it.

**Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

**Katalunio:** Sandra Vives Gomez, c/ Bonestar 64 3-3, 08940 Cornellà de Llobregat, (Barcelono). Rete: sandra@esperanto.cat.

**Litovio:** Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

**Nov-Zelando:** David Ryan, PO Box 3867, Wellington, NZ-6140. Rete: ryangomez@xtra.co.nz.

**Ruslando:** Галина Романовна Горецкая, 236039, Калининград, Старопрегольская наб., 10-13. Rete: laondodeesperanto@gmail.com.

**Slovakio:** Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: stano.marcek@gmail.com.

**Svedio:** Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå. Rete: leif.holmlund@telia.com.

**Usono:** Esperanto-USA, 91-J Auburn St #1248, Portland ME 04103. Rete: eusa@esperanto-usa.org.

Oni povas pagi la abonon ankaŭ al nia UEA-konto “avko-u” kaj per la internacia pago-sistemo PayPal ĉe <https://paypal.me/GGORETSKIY>.

**Ĝi estas demonstra versio de la 108-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**